# NIA PONTO

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstr
48005-BILBAO (Hispanujo)
Redaktas:
Jesús Miguel García Iturrioz

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

**La E-Grupo de Bilbao estis fondita la 20an de majo de 1906**
TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Juna(ĝis 30 jaroj): 20 €.
**KUTXABANK-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**JULIO/SEPTEMBRO 2023** **Nro. 136 (3/23)**



## NOVA PREZIDANTO.

La 26an de majo, dum ĝenerala kunveno, estis elektita nova Prezidanto de la E-Grupo de Bilbao, nome, **Yolanda Díez Sáiz de la Maza**.

Ni substreku, ke estas la dua fojo ke virino prezidas nian asocion. La antaŭa estis Igone Manciles, elektita la 30an de aprilo 1999a.

**LOKE ...**

# ĜENERALA KUNVENO.

Tiel kiel estis anoncite kaj postulas nia statuto, la pasintan 26an de majo oni okazigis la ĉiujaran ĝeneralan kunvenon de nia asocio. Ĝin ĉeestis 17 homoj.

Ĉefaj decidoj kaj aproboj estis jenaj:

1. Spezokonto 2022: Enspezoj: 3.395,59€. Elspezoj: 2.752,27€
   Saldo Kontanta mono (31/12/2022): 5.412,36€
   Entuta saldo (Kontanta mono+akcioj): 8.744,37€

2. Buĝeto por 2023: 7.270,00€

3. Ebla subvencio por partopreni E-kongreson: Post longa diskuto, antaŭvidante la monon alportotan dum 2023 pro renovigo de la konstruaĵo, oni decidis krei apartan fonduson kun mono alportota de volontuloj por subvencii tiun partoprenon al novbakitaj esperantistoj. Respondecas pri tiu fonduso: David Redondo kaj Diego Guerín.

4. Komenci la demarŝojn por fariĝi propietuloj de la sidejo: Oni nomumas komisionon por tio. Membroj: Carlos Llama, Igone Manciles, David Redondo, Octavio Gutiérrez kaj Diego Guerín.

5. Oni aprobas komenci la demarŝojn por iĝi asocio de publika utileco.

6. Riparoj de la konstruaĵo. Laŭlonge de la lastaj monatoj estis diversaj kunvenoj por informi pri la afero. Oni memorigas pri tio, ke la tuta sumo kiun ni devos alfronti estas 23.000€, kiu malgrandiĝos al pli malpli 13.000€ post la ricevo de helpoj fare de publikaj administracioj. Problemo estas ke tiu helpmono elĉerpiĝis, do oni ne scias ĉu la riparado antaŭeniros tiel kiel oni antaŭvidis.

7. En la tagordo aperis nova punkto ĉar pro privataj kialoj nia ĝisnuna prezidanto demisiis. Tiel kiel oftas, neniu kandidato sin proponis. Post longa interparolado, estis volontulino, nome Yolanda Díez Sáiz de la Maza. Ŝi akceptis kun unu sola kondiĉo: Okupos tiun postenon nur unu jaron.

8. Asocianino petas permeson por propagandi nian E-Grupon pere de sociaj retoj. Kompreneble, oni donis al ŝi tiun permeson kaj nian dankon pro tia laboro.

---




LOTERÍA DE NAVIDAD >>>>> Ver página 5.

Este año, **se puede comprar en Sevilla**, durante el congreso español. Basta dirigirse a cualquier miembro del grupo de Bilbao que esté allí.

---

## LOKE ...

# NOVAJ KURSOJ DE ESPERANTO / NUEVOS CURSOS.

**<u>AŬTUNA KURSO / OTOÑO / UDAZKENA</u>**

**<u>CURSO DE NIVEL MEDIO</u>**
Del **VIERNES 6 DE OCTUBRE (19:30H) al 15 de diciembre de 2023**

Dirigido a los que hicistéis el curso básico la pasada primavera. Veremos las 4 últimas lecciones pendientes del libro y haremos mucha conversación. También dirigido a todos aquellos con conocimientos previos del idioma que deseen progresar.

Curso gratuito. No es preciso inscripción.Todos los viernes de 19:30h a 20:30h, aunque nos solemos alargar hasta las 21h.

**<u>VINTRA KURSO / NEGUA / INVIERNO</u>**

**12 ENERO 2024 / FEBRERO 2024**
**<u>BABILRONDOJ en la oficejo</u>**
Todos los viernes de 19:30h a 20:30h
Rondas de conversación guiadas. Curso gratuito

**<u>PRINTEMPA KURSO / UDABERRIA / PRIMAVERA</u>**

**Marzo / Abril / Mayo / Junio 2024**
**<u>CURSO BÁSICO</u>**.

Para los que empezáis de cero o tenéis muy pocos conocimientos del idioma.
**<u>Necesita inscripción previa</u>**. Grupos limitados a 12 alumnos.

La enseñanza es gratuita, aunque hay que pagar el libro de texto y el diccionario (30 euros).

Se mandará mas información sobre este curso un mes antes de su comienzo.

# EĈ PLI ...

**<u>BABILRONDOJ / REUNIONES PARA CONVERSAR</u>**.

## **Comienzo: viernes 20 de octubre**.
## **Horario: de 19:00 h. a 20:00 h.**

Para aquellos que tengan ya un cierto nivel de Esperanto, aunque no sea muy elevado. Se elegirá previamente un tema de conversación y se hablará sobre ello. **<u>Sólo se permitirá hablar en Esperanto</u>**.

Será necesaria la **i<u>nscripción previa, como máximo hasta el 13 de octubre</u>**, a través del email del Grupo o en la propia sede.

El número mínimo de personas inscritas será de 5; en caso contrario, no se llevará a cabo.

**LOKE ...**

## E-instruado en kamparo.



La 25an de junio ni translokigis la klasĉambron al la kamparo kaj Pako, el Murcio, anstataŭis nian kutiman E-gvidanton.


Matene ni ekskursis al belega vilaĝo Tobera (Burgos), kie ni sukcesis bani nin sub la akvofalo de la rivereto Molinar.



La gelernantoj apenaŭ krokodilis kaj sekve multe progresis,kio estas la ĉefa celo de tiaj renkontiĝoj.

(*Informis David pere de vacapo. 26/06/2023*)

## Nova libro de Aitor Arana.




La vaska aŭtoro Aitor Arana publikigis novan libron, nome “La okulvitroj de Lidia”. Eta recenzo, kiu aperas en la reta paĝo de UEA: "... romanigita vivo de Lidia Zamenhof, grandparte bazita sur realaj eventoj kaj helpe de materialoj kaj pensoj de Lidia mem".

203 paĝoj. 21,00 € ĉe UEA.

Atentigo ricevita rete: “Se vi planas aĉeti la romanon "La okulvitroj de Lidia" de la eŭska esperantisto Aitor Arana, sciu, ke ĉe la bjalistokanoj ĝi estas multe malpli kosta ol ĉe UEA: 11,50 € kontraŭ 21,00 €.



## Ankaŭ niaj asocianoj veturas.

Jen niaj amikoj David kaj lia filo Hodei, la 4an de septembro en Bonn, dum kunveno kun lokaj esperantistoj.

## LOKE ...

## KRISTNASKA LOTERIO. (Ĉi-jare ankaŭ en Sevilo dum H.K.)




Ni daŭrigas la disvendadon de la tradicia kristnaska loterio. La ĉi-jara numero estas **72.944**.

**Ĉiu bileto kostas 5 €**, el kiuj oni lotludas 4 € kaj restas 1 € kiel donaco al la Grupo.
**Oni rezervas biletojn al neniu**.

**Kaj memoru ke, kiel kutime, ankaŭ eblas aĉeti loterion per interreto**:

Por tio sekvu la jenajn paŝojn:

1. Enkontigu la monon en la konto de la Grupo Esperantista de Bilbao.
   IBAN-kodo: **ES56-2095-0141-4122-1800-1550**.
2. Sendu retmesaĝon al **esperantobi@gmail.com** informante pri la monenkontigo.
3. Ni sendos la skanitajn biletojn per retpoŝto. La originaloj restos en la E-Grupo de Bilbao.
4. Se la biletoj estus premiitaj, ni rekte sendus la monon al la bankokonto indikita de la aĉetinto, tute senpage por li aŭ ŝi.
5. Tiu, kiu volus ricevi la originalajn biletojn post la lotado, bv. sendi retmesaĝon al **esperantobi@gmail.com** kaj ni sendos ilin per normala poŝto al la adreso indikita de la aĉetinto.

**Como de costumbre, también se puede comprar la lotería de Navidad por internet. Último día para comprar: sábado 17 de diciembre. No se reserva.**

Para ello:

1. Hay que ingresar el dinero en la cuenta del Grupo Esperantista de Bilbao. IBAN: **ES56-2095-0141-4122-1800-1550**. **Cada billete cuesta 5 €**, de los que se juegan 4 €, quedando 1 € como donativo para el Grupo.

2. Hay que enviar un e-mail a **esperantobi@gmail.com** dando cuenta del ingreso.

3. Enviaremos los billetes, escaneados, por e-mail. Los originales quedarán depositados en el Grupo de Bilbao.

4. Si los billetes resultan premiados, enviaremos el dinero, directamente, a la cuenta indicada por el comprador, sin gasto alguno para éste.

5. Quien quiera recibir los billetes originales, una vez realizado el sorteo, debe enviar un e-mail a **esperantobi@gmail.com** y se los enviaremos, por correo ordinario, a la dirección que se nos indique.

**ATENTU!**:

Ĉi-jare **eblos aĉeti loteribiletojn** de la E-Grupo de Bilbao **en Sevilo**, dum la hispana kongreso. Vi devas nur peti ilin al kiu ajn bilbaoano partoprenanta la kongreson.

**H.E.F.**

## Pretas jam la unua programo de la hispana E-kongreso 2023.



Se vi ne havas tempon en somero aŭ se vi deziras plani kun pli da tempo, memoru ke en aŭtuno ni celebros en Sevilo la Hispanan Kongreson de Esperanto, inter la 12a kaj 15a de oktobro.

La organizantoj jam publikigis la unuan malneton de la programo, dum kiu ni povas konfirmi la ĉeeston de Duncan Charters, prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio (UEA), kiu prelegos pri la temo de la kongreso, "komprenemo inter popoloj". Oni nun laboras ankaŭ super la organizado de universitata antaŭkongreso, al kiu ĉiuj kongresanoj estas invitataj, la 10an kaj 11an de oktobro, en la Fakultatoj de Filologio kaj Psikologio, kiu ĝuos la partoprenon de ampleksa aro da internaciaj prelegantoj.


Jam aliĝis al la kongreso 147 personoj (03/10/2023), el pli ol dekkvin landoj. La bazaj informoj kaj la aliĝilo troviĝas en https://kongreso.esperanto.es/eo.

Inter la aliĝintoj estas 5 membroj de la Grupo de Bilbao.

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 88. Jul. 2023)*

## Eĥo de la traduko de Delibes al Esperanto.

Kiel ni sciigis en pasinta Bitbulteno, estis publikigita la traduko al Esperanto de *Sinjorino en ruĝo sur griza fono,* unu el la ĉefaj romanoj de Miguel Delibes (1920-2010), eble la plej populara verkisto en Kastilio en la mezo de la 20a jarcento.




La Fondaĵo Esperanto, kiu kunlaboris en la eldonado, organizis kampanjon por diskonigo inter la ekstera publiko. Kiel konsekvenco, diversaj amaskomunikiloj de la kastilia regiono eĥis la informon, inter kiuj la ĉefaj informagentejoj EFE kaj Europapress kaj kelkaj ĵurnaloj kaj radiostacioj.



La direktoro de la Fondaĵo Esperanto vizitis la Fondaĵon Miguel Delibes de Valadolido, kreitan de la filoj de la romanisto por konservi lian intelektan heredaĵon, kaj donacis ekzempleron al ties direktoro (vidu foton de li kun la libro en la hispanlingva parto de tiu ĉi bulteno). Oni donacis ekzemplerojn ankaŭ al la Nacia Biblioteko kaj la Biblioteko de Kastilio kaj Leono, tiel ke la libro estos je la dispono de esploristoj kaj interesitoj.
La libron oni povas akiri en la libroservo de Hispana Esperanto-Federacio.

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 88. Jul. 2023)*

**H.E.F.**

## Mortis Augusto Casquero.



La 19an de septembro alvenis ege malgaja novaĵo: mortis Augusto Casquero. Malgraŭ ke li malbonfartis de antaŭ kelkaj jaroj, la novaĵo surprizigis nin.

Homo ege konata tra la tuta Esperantujo ĉar instruis nian lingvon diversloke: en Pollando, Ĉinio, Vietnamio, landoj kie li loĝis dum jaroj.



Prezidanto de Madrida E-Liceo kaj de la Valencia E-Grupo, Prezidanto de Hispana E-Federacio (2005-08), Prezidanto de la LKK de la 78a UK en Valencio (1993), Vicprezidanto de Monda Turismo.

Sur la dekstra foto, Augusto kun la Sekretario de la E-Grupo de Bilbao dum Universala Kongreso en Vilnius (Litovio)

Ke li pace ripozu!

## La persona arkivo de Vicente Inglada en la Nacia Biblioteko de Hispanio.

La Nacia Biblioteko de Hispanio akceptis donace la personan arkivon de Vicente Inglada (Alicante, 09/01/1879 – Madrid, 07/01/1949).



Vicente Inglada Ors (1879-1949) estis profesoro pri astronomio, geodezio kaj meteologio, geografia inĝeniero, sismologo, poligloto, staba oficiro, verkisto, studemulo pri tertremoj kaj aliaj fenomenoj de la naturo, akademiano de pluraj sciencaj institucioj, poeto kaj... esperantisto. Do, elstara personeco, influa en ĉiuj kampoj en kiuj li laboris, inkluzive de la hispana Esperanto-movado. En tiu ĉi tereno, li laboris kaj en organizaj taskoj de la movado kaj en la disvastigo kaj instruado de la lingvo. Li ankaŭ esperantigis pli ol dudek verkojn de hispana literaturo, ĉefe teatraĵojn, tiel kontribuante al la disvastigo de la hispana kulturo internacie.

Li kunmetis laŭlonge de sia vivo grandan bibliotekon pri siaj du grandaj pasioj, geofiziko kaj Esperanto. La sorto de tiu biblioteko-arkivo post lia morto restas nekonata, sed ĝi nun aperis en la manoj de kolektisto. Post diversaj provoj akiri ĝin, la arkivo estis donacita al la Nacia Biblioteko, kiu akceptis ĝin kaj komencis ĝin katalogi.

Ni kuraĝigas scivolemulojn kaj esploristojn pri la historio de la Esperanto-movado interesiĝi pri tiu ĉi akiritaĵo de la Nacia Biblioteko.

# TRA LA MONDO …

## Hispanio petas pliajn oficialajn lingvojn por EU.

La registaro de Hispanio oficiale petis de EU, ke tri regionaj lingvoj – la kataluna, la eŭska kaj la galega – ekhavu oficialan staton en la Unio. Tion postulis alianco de malgrandaj partioj por subteni la elekton de reprezentanto de la maldekstra bloko al la parlamentestra posteno.

La ŝtataj registaroj devas peti oficialigon de lingvoj por ke la koncerna instanco de Eŭropa Unio decidu tion. Tio okazis en ĵaŭdo pri la kataluna, la eŭska kaj la galega, kies oficialigon formale petis la hispana registaro. Dek ok minutojn post la oka, la hispana ambasadoro al EU prezentis leteron prian de la hispana ministro pri eksterlandaj aferoj al la ĝenerala sekretariino de la Konsilio de EU. La horo gravas, ĉar je la deka komenciĝis plenkunsido de la ĵus elektita deputitaro de Hispanio.

Ili devis elekti novan prezidanton de sia asembleo (Kongreso de Deputitoj). Nek la maldekstra nek la dekstra bloko havas majoritaton en la parlamento. La elekto tute dependis de aliancoj kun etaj partioj, ĉefe kun tiuj kiuj defendas kulturojn malsamajn ol la hegemonia kastilia.

Dum sia unua parolado la nova prezidantino de la deputitaro, Francina Armengol, rekte defendis la lingvan diversecon de Hispanio kaj promesis ne malpermesi kiel ĝis nun la uzadon de la kataluna, la eŭska kaj la galega en la hispana parlamento. Armengol estas katalunparolanto, baleardevena, kaj ĝis antaŭ du monatoj prezidis la balearan aŭtonoman registaron.

Kiel balearano mi povas diri ke ŝi ne kontraŭis dum·sia regado la normaligon de la kataluna en la Baleara insularo. Kiel baleara prezidentino ŝi eĉ akceptis prezidi la pasintan solenan malfermon de Institut d'Estudis Catalans, kies sidejo kuŝas en Barcelono (do, ekster la insuloj) kaj pritraktas sciencon kaj kulturon de la tuta Kataluna Landaro kaj, plej grave, ĝia Filologia Sekcio (kiun mi prezidas nuntempe) estas la oficiala lingva akademio de la kataluna.

Pri la oficialaj lingvoj en Hispanio krom la kastilia, mi diru ke la galega iumaniere jam estis oficiala en EU, se oni akceptas ke la limo kun la portugala estas nur dialekta. La eŭska teritorio parte kuŝas en nuntempa Hispanio kaj parte en nuntempa Francio. La kataluna lingva teritorio dividiĝas inter Hispanio, Francio, Italio kaj Andoro (kies nura oficiala lingvo ĝi estas).

La hodiaŭa peto de la hispana registaro estas historia pro tio ke unuafoje la ŝtato internacie montras sian lingvan diversecon, kaj ankaŭ pro tio ke eŭropaj civitanoj kiel mi post la akcepto fare de EU vidos kiel nia lingvo (do la gepatra, unua, familia, nature lernita, ne altrudita laŭleĝe) ricevas la respekton de transnacia organizo kiu ekde nun ne plu traktos nin kiel eksterlandanojn per fremda lingvo.

*(Nicolau Dols - Libera Folio. 18/08/2023. Ricevite per reto)*

## E-kongresoj 2023/24.

- 12/15 okt. 81-a Hispana Kongreso. Sevilo/Sevilla.
- 2024 IJK. Ŝventoji (Litovio).
- UK. Aruŝo (Tanzanio).